# *II-a internacia kongreso: protekti la infanaron*




Fini?is en Havano la II-a internacia konferenco de protektado al la infanaro kie oni pritraktis temojn rilate al la integrala traktado kaj protekto al la infanoj.
La evento sesiis per prezento de prelegoj kaj paneloj kie oni debatis pri la ?efaj homrilataj kaj kondutaj problemoj kiuj povas dama?i infanojn kaj adoleskantojn
La konferencon, organizitan de la ministerio pri internaj aferoj, partoprenis pli ol 100 delegitoj landaj kaj eksterlandaj, kiuj anka? debatis pri pozitivaj spertoj en la apliko de bonaj praktikoj por protekti la infanan sanon.
Aliflanke, reprezentantoj de la fakultato pri komunikado de la Havana Universitato prezentis la projekton *Escaramujo*, bazita sur la popola eduko por integrala traktado de infanoj.
La ferman sesion partoprenis pli ol 20 funkciuloj de la regionaj oficejoj de la Fonduso de UN por la infanaro (UNICEF) kaj ?in gvidis Begoña Arellano, reprezentanto de tiu internacia organismo en Kubo.
Tiu ?i evento markis la 25-a datrevenon de la Konvencio pri Infanaj Rajtoj, internacia traktato de UN, kiun Kubo subskribis dekomence. La insulo gastigis en la jaro 2008 la unuan regionan konferencon pri protektado al la infanaro.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/24443-ii-a-internacia-kongreso-protekti-la-infanaron

# Radio Habana Cuba